

Esperanto



La titolo havas ankaŭ aliajn signifojn, por vidi ilin bonvolu rigardi la apartigan paĝon: Esperanto (apartigilo), {{{2}}}, {{{3}}}, {{{4}}}, {{{5}}}

Esperanto Lingvo Internacia	
Parolata en	ĉ. 120 landoj en la tuta mondo
Denaskaj parolantoj	kelkaj miloj ^[1]
Fremdlingvo / dua lingvo por	taksoj inter 100.000 kaj 2.000.000 (depende de difino de <i>Esperanto-parolanto</i>) ¹ (planlingvo n-ro 1)
Skribo	latina kun kelkaj aldonoj
Lingvistika klasifiko	
Planlingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	neniu lando; multaj NRO-oj (ĉefe Esperanto-asocioj)
Reguligita de	Akademio de Esperanto
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	eo
ISO 639-2	epo
SIL	ESP
Specimeno	
<p>Sur la kampo, for de l' mondo, Antaŭ nokto de somero, Amikino en la rondo Kantas kanton pri l' espero. Kaj pri vivo detruita Ŝi rakontas kompatante, – Mia vundo refrapita Min doloras resangante.</p> <p>— L. L. Zamenhof, <i>Mia penso</i></p>	

Esperanto (origine **Lingvo Internacia**) estas la plej disvastigita internacia planlingvo.^[2] La nomo venas de la kaŝnomo "Dr. Esperanto", sub kiu la juda kuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhofo en la jaro 1887 publikigis la bazon de la lingvo. Li intencis krei facile lerneblan neŭtralan lingvon, taŭgan por uzo en la internacia komunikado, tamen ne anstataŭigi aliajn, naciajn lingvojn.

🔊 Prelego de Zamenhofo en la 1-a monda kongreso de Esperanto en franca Bulonjo (1905)


Kvankam neniuj ŝtatoj akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon, ĝi estas uzata de internacia komuno, nombranta laŭ diversaj taksoj cent mil ĝis du milionoj da parolantoj (depende de la lingvonivelo); estas proksimume unu milo da denaskaj parolantoj.^[3]

Esperanto akiris kelkajn internaciajn distingojn, ekzemple du rezoluciojn de UNESKO aŭ subtenon de konataj personoj de la publika vivo. Nuntempe ĝi estas uzata por vojaĝado, korespondado, interkompreniĝo dum internaciaj

renkontiĝoj kaj kulturaj interŝanĝoj, kongresoj, sciencaj diskutoj, origina kaj tradukita literaturo, muziko, teatro, kino, presita kaj interreta raportadoj, radia kaj televida elsendadoj.

La vortprovizo de Esperanto devenas plejparte el la okcidenteŭropaj lingvoj, dum ĝia sintakso kaj morfologio montras ankaŭ slavlingvan influon. La morfemoj ne ŝanĝiĝas kaj oni povas ilin preskaŭ senlime kombini, kreante diverssignifajn vortojn, Esperanto do havas multajn kunaĵojn kun la analizaj lingvoj, al kiuj apartenas ekzemple la ĉina; kontraŭe la interna strukturo de Esperanto certagrade respegulas la aglutinajn lingvojn, kiel la japanan, svahilan aŭ turkan.

Historio



Ludoviko Lazaro Zamenhofo

Ekesto

Junaĝo de Zamenhofo

Ĉe la ekesto de Esperanto staris Ludoviko Lazaro Zamenhofo. Li travivis sian junecon en la multlingva urbo Bjelostoko, tiam apartenanta al la Rusa Imperio, hodiaŭ al Polujo, kie li ofte povis pririgardi kverelojn inter la unuopaj tie loĝantaj etnoj, do rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj. Ĉar li neekziston de komuna lingvo konsideris la ĉefa kialo de la konfliktoj, eklaboris jam kiel lerneĵano pri projekto de nova konvena lingvo, kapabla plenumi la taskon. Ĝi devus esti – malsame al la naciaj lingvoj – neŭtrala kaj facile lernebla, tial ankaŭ akceptebla kiel la dua lingvo por ĉiuj, lingvo instruata samtempe kun tiuj naciaj kaj uzata en situacioj, kiam necesas kompreniĝo internacia.^[4]

La unuaj ideoj

Zamenhofo unue cerbumadis pri revivigo de la latina, kiun li lernis en lernejo, sed konkludis, ke ĝi estas tro komplika por normala komunikado. Lernante la anglan, li rimarkis, ke la verba konjugacio laŭ genro kaj nombro ne necesas kaj ke gramatika sistemo de lingvo povas esti multe pli facila, ol li opiniis antaŭe. Daŭris tamen la lerna malhelpo pro granda kiomo de parkerigendaj vortoj. Foje ekrimarkis Zamenhofo du rusajn surskribojn: *швейцарская* [ŝvejcarskaja] (pordistejo, vorto derivita de *швейцар* [ŝvejcar] – pordisto) kaj *кондитерская* [konditerskaja] (dolĉaĵejo, derivita de *кондитер* [konditer] – dolĉaĵisto). Tiuj vortoj kun la sama sufikso inspiris lin al la ideo, ke uzado de regularaj afiksoj povus konsiderinde malplimulti la kiomon de la vortoradikoj necesaj por komuniki. Por ke la radikoj estu kiel eble plej internaciaj, li decidiĝis transpreni la vortprovizon plejparte el la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj, do el tiuj instruataj tiam tutmonde pleje.^[5]



La unua lernolibro de Esperanto, eldonita en Varsovio jare 1887

Fina versio

La unua projekto de Zamenhofo, nomita *Lingwe uniwersala*, estis pli malpli preta jam en la jaro 1878, sed la patro de la aŭtoro, instruisto de lingvoj, konsideris la laboron vana kaj utopia, tial li verŝajne perdis la manuskribon, konfiditan al li de la filo. Inter la jaroj 1879–1885 Zamenhofo studis medicinon en Moskvo kaj Varsovio. Tiutempe li denove eklaboris pri la internacia lingvo. La unuan renovigitan version li instruis jare 1879 al siaj amikoj. Post kelkaj jaroj li jam tradukis poezion, por ke kiel eble plej perfektigi la lingvon. En la jaro 1885 li skribis: „*Ses jarojn mi laboris pri perfektigo kaj testado de Esperanto, kvankam jam en la jaro 1878 ŝajnis al mi, ke la lingvo tute pretas.*”^[6]

Kiam li jam preparis publikigon de la lingvo, la caraj cenzuristoj malpermesis tion. Zamenhofo estis tre elrevigita pro tio kaj sian libertempon pasigis per tradukado ekz. de la Malnova Testamento aŭ kelkaj teatraĵoj de Shakespeare. Fine en la jaro 1887 li povis eldoni la unuan lernolibron, kun la nomo «*Международный языкъ*» (*La internacia lingvo*). Fakte tio estis la sama lingvo, kiun oni ĝis hodiaŭ parolas. Laŭ la kaŝnomo de Zamenhofo *Doktoro Esperanto*, sub kiu la libro estis eldonita, la lingvo baldaŭ eknomiĝis *La lingvo de d-ro Esperanto* kaj pli malfrue mallongigite *Esperanto*.^{[5][7][8][9]}

La unuaj ŝanĝprovoj

Zamenhofo ricevis grandan kvanton de entuziasmaj leteroj, enhavantaj ofte ankaŭ proponoj de diversaj ŝanĝoj en la lingvo. Ĉiujn sugestojn li registris kaj pli malfrue komencis publikigi en la ĵurnalo *La Esperantisto*, eldonata tiam en Nurenbergo. En la sama periodaĵo li dufoje balotigis la legantojn pri la ŝanĝoj, la plejmulto tamen malkonsentis. Post tiuj voĉdonadoj por certa tempo silentiĝis voĉoj dezirantaj reformojn kaj la lingvo ekdisvastiĝadis. Plej multajn abonantojn la ĵurnalo havis en tiama Rusujo. Grandan baton ĝi tial suferis, kiam la cara cenzuro malpermesis ĝian disvastigon pro artikolo de Lev Nikolajevič Tolstoj. La ĵurnalo devis esti malestigita, sed post nelonge ĝin anstataŭis nova, nomata *Lingvo Internacia*. Ĝi unue estis eldonata en sveda Upsalo, poste en Hungarujo kaj fine en Parizo, kie la eldonadon finis nur la unua mondmilito.^{[10][11][12][13]}

Disvastiĝo de la lingvokomunumo

La novan internacian lingvon ĝiaj uzantoj komencis uzi ankaŭ por organizi fakajn kaj ŝatokupajn aktivadojn internacive. Dum la unuaj jardekoj la komunikado en Esperanto realiĝis preskaŭ nur skribe, sed post nesupozite sukcesa Universala Kongreso, okazinta 1905 en franca Boulogne-sur-Mer, kie pruviĝis ebleco uzi la internacian lingvon eĉ parolforme, komencis rapide kreski ankaŭ personaj kontaktoj kaj renkontiĝoj inter Esperantistoj.

Jam dum la Universala Kongreso en Barcelono jare 1909 realiĝis kelkaj renkontiĝoj de ĉeestantaj katolikoj, kiuj fine decidis organizi venontjare, do en 1910, apartan kongreson de katolikaj Esperantistoj.

Dum ĝi estis fondita la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kies ĉefa organo, la ĵurnalo *Espero Katolika*, tamen estis eldonata jam ekde 1903 kaj nun do temas pri la plej malnova ĝis nun aperanta Esperanta periodaĵo.^[14]

En la jaro 1912 Zamenhof dum solena sermono enkadre de la 8-a UK en Krakovo rezignis sian oficialan rolon en la movado. La deka Universala Kongreso estis okazonta en Parizo jare 1914, aliĝis tien preskaŭ 4000 homoj, sed komencanta milito malebligis ĝin kaj Zamenhof povis reveturi hejmen nur tra la Skandinavajn ŝtatojn.

La sopiro pri paco kaj harmonio post la Unua Mondmilito vekis novajn esperojn, danke kion Esperanto estis rapide disvastiĝanta. La unua Universala Kongreso post la milito okazis jare 1920 en Haag, la 13-a UK jare 1921 en Prago. En 1927 en la Viena kastelo Hofburg estis fondita la memstara Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj, kiu en



La unua Universala Kongreso de Esperanto en
Bulonjo-ĉe-Mar

1929 alkroĉiĝis al la Aŭstruja Nacia Biblioteko kaj hodiaŭ rezidas en aparta konstruaĵo.^[15]

En la intermilita periodo kaj la dum la Dua Mondmilito, okazis persekutado kontraŭ esperantistoj, inter alie en Germanio sub naziismo kaj en Sovetunio sub stalinismo.



Rotterdam, 2008: La 93-a Universala Kongreso de Esperanto kun 1845 partoprenantoj

Post la dua mondmilito

La klopodoj akceptigi Esperanton kiel universalan lingvon renkontadis pozitivan respondon: Petskribojn favore ĝin adresitajn al la Unuiĝintaj Nacioj subskribis pli ol 80 milionoj da homoj, en Ĉeĥoslovakujo ekzemple ankaŭ la Nobel-premiito profesoro Jaroslav Heyrovský.^[16]

La Ĝenerala Asembleo de UNESCO akceptis similajn rezoluciojn en Montevideo la 10-an de decembro 1954 kaj en Sofio la 8-an de novembro 1985. En ili ĝi notis *la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo*, invitis la membrajn ŝtatojn *instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri*

Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado kaj rekomendis al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj *aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de UNESCO.*^[17]

Esperanton favoris ankaŭ pluraj estroj de la Pola Scienca Akademio (Polska Akademia Nauk). La jubilean 72-an Universalan Kongreson jare 1987 (centjariĝo de la lingvo-publikigo) partoprenis preskaŭ ses mil homoj de 60 nacioj.



Ankaŭ la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista atingis gravan progreson, kiam en la jaro 1990 estis eldonita la dokumento *Norme per la celebrazione della Messa in esperanto*, per kiu la Sankta Seĝo permesas servi sanktan meson en Esperanto sen neceso de specialaj permesoj. Esperanto tiel fariĝis ununura aprobita konstruita liturgia lingvo de la Katolika Eklezio.^{[18][19][20]}

La fakto, ke multaj celoj de la Esperanta movado ne realiĝis, estas atribuata interalie al teknologia kaj kultura hegemonio de Britujo kaj Usono, precipe en la tempo post la dua mondmilito, kio rezultigas hodiaŭan uzon de la angla kiel komunika lingvo de plej multaj internaciaj agadoj.^[21]

Esperanto nuntempe



Dulio Magnani transdonas Esperantan legajaron al papo Johano Paŭlo la 2-a (1997)

Esperantaj simboloj	
Esperanta flago	Jubilea simbolo
	

En la nuna mondo, kiu ĉiam pli konscias rajtojn de malplimulto kaj lingvan diversecon, akiras la internacia lingvo ree atenton de iuj gravuloj. Neregistaraj organizoj kaj asocioj insistas, ke la diskuto pri la internacia lingvo aperu kiel diskuttemo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Unio. Julie 1996 Simpozio de internaciaj organizoj kunvenigis omaĝe al Inazo Nitobe en Pragon grupon de sendependaj ekspertoj, kiuj esploris tiaman pozicion de Esperanto kaj proponis ĝian envicigon en aktualaj interparoloj pri lingvaj rajtoj kaj politiko. La Manifesto de Prago (akceptita dum UK 1996 en Prago), moderna deklaro pri valoroj kaj celoj motivantaj Esperantan movadon, emfazas lingvan demokration kaj konservon de la lingva diverseco. Al famuloj uzantaj Esperanton nuntempe apartenas interalie la Nobel-premiito Reinhard Selten (1994), mondĉampionoj en ŝakludo Judit Polgár kaj Tivadar Soros la patro de la financisto George Soros. Esperanto estis kiel komunikilo uzata ankaŭ en la projekto Indiĝenaj Dialogoj, al kies celoj apartenis plifortigi interŝanĝon de spertoj inter indiĝenaj popoloj en la mondo, kiuj rifuzas uzon de iamaj koloniaj lingvoj.

La kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof, sciis, ke lingvo estas disvastigenda per kolektiva uzo, tial li limigis sian komencan proponon je minimuma gramatiko kaj malgranda vortprovizo. Hodiaŭ tamen Esperanto estas plene disvastigita lingvo kun tutmonda komunumo de parolantoj kaj kompleta esprimaparato. Multaj ideoj de Zamenhof antaŭiris la ideojn de la fondinto de la moderna lingvistiko Ferdinand de Saussure, kies frato estis Esperantisto.

Stato de la lingvoevoluo

Komence, la lingvo konsistis el ĉirkaŭ mil vortradikoj, el kiuj oni povis krei 10–12 mil vortojn. La nunaj esperantaj vortaroj enhavas ofte eĉ 15–20 mil radikojn, el kiuj jam da vortoj deriveblas centmiloj; krome la lingvo daŭre evoluas. La aktualajn tendencojn observas kaj kontrolas la Akademio de Esperanto. Dum sia historio, Esperanto estis uzita por atingi diversajn celojn, iujn el ili eblas taksu problemaj. La lingvo estis malpermesita kaj ĝiaj uzantoj persekutataj kaj dum la erao de Stalin, konsideranta ĝin „lingvo de mondĉivitanoj“, kaj dum Hitler, por kiuj ĝi estis „lingvo de Hebreoj“ (ĉar Zamenhof, la kreinto, mem estis Hebreo).^[22]

La nuna Esperanto estas rezulto post kolektiva laboro de centoj da filologiistoj, poetoj, verkistoj kaj da tri generacioj de ĝiaj uzantoj.^[23] Dum pli ol 120 jaroj kreiĝis miloj da vortoj, esprimoj, frazfiguroj, metaforoj ks., ellaboriĝis ankaŭ dekoj da fakaj vortaroj por diversaj sciencoj.

Uzantoj de la lingvo

La Universala Esperanto-Asocio (UEA), kies membroj konsistigas la plej aktivan parton de la Esperantista komunumo, havas siajn naciajn filiojn en 62 ŝtatoj kaj individuajn membrojn en preskaŭ duobla kvanto de ŝtatoj. La nombro de venditaj lernolibroj kaj membrostatistikoj de lokaj grupoj montras, ke ekzistas jam centmiloj aŭ eĉ milionoj da homoj kun almenaŭ minimuma scio de la lingvo. Parolantoj de Esperanto troveblas en la tuta mondo, plej koncentriĝinte en tiom malsamaj landoj kiel estas Brazilo, Bulgarujo, Ĉinujo, Irano, Japanujo, Kubo aŭ Madagaskaro.

Laŭ indikoj de la projekto *Ethnologue* estas la suma kvanto de la parolantoj taksata je du milionoj, el kiuj du milojn konsistigas denaskuloj, precipe danke uzon de Esperanto en hejmoj, plej ofte en internaciaj familioj.^[3] La historiisto kaj Esperantisto Ziko Marcus Sikosek indikis la takson troigita, baziĝante sur komparo kun realaj nombroj de parolantoj en Kolonjo kaj kiomoj de membroj en Esperantaj organizaĵoj.^[24] Aliaj taksoj indikas pli modestajn numerojn, kutime inter centmilo kaj miliono. Neprecizaĵoj en la pritaksoj baziĝas sur la fakto, ke nombron de parolantoj de iu ajn internacia helplingvo estas malfacile ekscii, ĉar ekzemple popolnombradoj en plimulto da ŝtatoj

demandas nur pri gepatra lingvo de la loĝantoj, ne pri iliaj pluaj lingvosocioj.^[25]

Instruado de Esperanto

Tre rapide eblas komenci interkompreniĝi internacilingve, kio prezentas idealan enkondukon al lernado de fremdaj lingvoj. Jam post kelkaj semajnoj povas lernantoj komenci korespondi Esperante kaj post kelkaj monatoj ili jam kapablas enkadre de siaj kursoj aŭ private vojaĝi eksterlanden uzante la lingvon.

Eksperimentaj kaj neformalaj observadoj aludas, ke antaŭa lernado de Esperanto eĉ povas pozitive efiki al posta ekposedado de aliaj fremdaj lingvoj (oni nomas tion propedeŭtika efekto). Realigis jam kelkaj provoj formale esplori la fenomenon: ekzemple grupo de studentoj, lernintaj dum unu jaro Esperanton kaj poste dum tri jaroj la Francan lingvon, havis pli bonajn rezultojn ol kontrolgrupo, kiu lernis la Francan dum la tutaj kvar jaroj.^[26] Similajn rezultojn oni akiris ankaŭ kiam la dua lingvo estis la Japana aŭ malplilongiginte la eksperimenton je duono. Tamen, la menciita studo ne skribas, kiel progresas studentoj, kiuj lernis en la unua jaro alian lingvon ol Esperanton, ekzemple Latinon.



Esperanto estas ununura agnoskita liturgia planlingvo de la Katolika Eklezio

Kvankam Esperanto estas instruata de iuj universitatoj, ekz. ĉe la Masaryk-Universitato en Brno (Ĉeĥujo), plej ofte homoj lernas ĝin mem, pere de korespondaj aŭ plurmediaj kursoj (kaj poŝte kaj retpoŝte), pere de retejoj kiel *lernu!* aŭ en lokaj kluboj de Esperanto. Lernolibroj kaj aliaj helpiloj por memlernantoj ekzistas en pli ol cent lingvoj.

Oficiala statuso

Esperanto estas oficiala lingvo de neniu ŝtato, kvankam komence de la 20-a jarcento ekzistis planoj estigi Moresneton kiel entute unuan Esperantan ŝtaton kaj sur la mallonge ekzistanta artefarita Insulo de la Rozoj ekzistis en la jaro 1968 mikronacio, uzanta Esperanton kiel sian oficialan lingvon. Tiu tamen servas kiel oficiala laborlingvo por kelkaj (plejofte Esperantaj) senprofitaj neregistaraj organizaĵoj.^[27] Esperanto ankaŭ estas ununura agnoskita artefarita liturgia lingvo de la Katolika eklezio.^{[18][19][20]}

En la jaro 1954 la Ĝenerala Asembleo de UNESCO agnoskis, ke la rezultoj atingitaj de Esperanto kongruas kun celoj de la organizaĵo. Sekve de tio oni estigis oficialajn rilatojn inter UNESCO kaj la Universala Esperanto-Asocio, kiu iĝis neregistara membra organizaĵo en la kategorio B.^[28] Kunlaboro inter ili daŭras: jare 1977 la ĝenerala direktoro de UNESCO Amadou-Mahtar M'Bow prezentis sian parolon dum la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Islanda Rejkjaviko. En 1985 la Ĝenerala Asembleo de UNESCO instigis la membrajn ŝtatojn kaj internaciajn organizaĵojn enkonduki studprogramojn pri la lingva problemo kaj Esperanto en lernejoj, kaj studi eblon eluzi la lingvon en internaciaj rilatoj. La Universala Esperanto-Asocio havas konsilajn rilatojn ankaŭ kun la Unuiĝintaj Nacioj (UN), UNICEF, Konsilio de Eŭropo, Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAS) kaj Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO).^{[17][29]} Ekde marto 2010, usona Prezidanto Barack Obama pripensas, ĉu Esperanto povus esti instruata en lernejoj.^[30]

Surbaze de decido de la urba konsilantaro, ekde la 11-a de Julio 2006 la Germana urbo Herzberg am Harz oficiale nomiĝas *Esperanta urbo* (*Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt/La Esperanto-urbo*), kio ligiĝas kun organizado de kulturaj kaj klerigaj aranĝoj kun rilato al Esperanto. Herzberg estas partnerurbo de la Pola urbo Góra, iliaj interŝanĝoj reliĝas Esperante.

Uzo de Esperanto

Renkontiĝoj kaj vojaĝado

Ĉiujare okazas centoj da internaciaj konferencoj kaj renkontiĝoj – sen interpretistoj. La plej grandaj estas la Universalaj Kongresoj de Esperanto, lastafoje organizitaj en la urboj Fortaleza, Brazilo (2002); Gotenburgo, Svedujo (2003); Pekino, Ĉinujo (2004); Vilno, Litovujo (2005); Florenco, Italujo (2006); Jokohamo, Japanujo (2007); Roterdamo, Nederlando (2008); Bjalistoko, Polujo (2009); Havano, Kubo (2010); Kopenhago, Danio (2011). Ekde 1938 estas organizataj ankaŭ Internaciaj Junularaj Kongresoj. La unua simpozio de Esperantistoj el Arabaj landoj okazis en Amano jare 2000, la kvina Tutamerika kongreso jare 2001 en Meksikurbo kaj Azia kongreso en Seulo jare 2002.

Pasporta Servo estas servo subtenanta uzon de Esperanto por vojaĝado. Ĝin prizorgas la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ties fundamento estis ĝis 2008 ĉiujare eldonata libreto, enhavanta adresojn de ĉirkaŭ 1300 gastigantoj el 89 ŝtatoj (laŭ la eldono el 2007), provizantaj senpagan loĝigon por vojaĝantoj parolantaj Esperanton. Ekde 2009 la servo disponeblas baze en elektronika formo, interrete, tamen presita listo de gastigantoj ankaŭ estas presota.^[31]

Esploro kaj bibliotekoj

En multaj universitatoj Esperanto estas parto de lingvosciencaj kursoj, iun proponas ĝin kiel sendependan studfakon. Precipe estas rimarkinda la Universitato de Eötvös Loránd en Budapeŝto kun sekcio de Esperantoscienco en la Instituto de Ĝenerala kaj Aplikita Lingvoscienco, kaj la Universitato de Adam Mickiewicz en Pola Poznano kun diploma programo pri interlingvoscienco.^[32] La bibliografio de la Usona Asocio de Modernaj Lingvoj registras ĉiujare pli ol 300 fakajn publikaĵojn pri Esperanto. La biblioteko de la Esperanto-Asocio de Britujo enhavas pli ol 20 mil pecojn. Al pluaj grandaj bibliotekoj apartenas la Biblioteko Hector Hodler en la Roterdama centro de la Universala Esperanto-Asocio, Germana Esperanto-Biblioteko en la urbo Aleno aŭ la biblioteko de la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj en Vieno, kiu estas parto de la Aŭstruja Nacia Biblioteko. La bibliotekoj en Vieno kaj Aleno liveras informojn pri siaj kolektoj ankaŭ perrete kaj atingeblas pere de la interŝtata interbiblioteka pruntservo.



Biblioteko de la Hispana Esperanta Muzeo disponas pli ol 10 000 librojn kaj 13 000 jarkolektojn de Esperantaj gazetoj

Profesiaj kontaktoj kaj fakaj interesoj

Organizaĵoj por Esperanto-parolantoj inkluzivas tiujn por kuracistoj, verkistoj, fervojistoj, sciencistoj, muzikistoj kaj multaj aliaj. Ili eldonas revuojn, organizas konferencojn kaj helpas disvastigi la lingvon por profesia kaj faka uzo. Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), faciligas kunlaboron sur la universitata nivelo. Originalaj kaj tradukitaj verkoj aperas pri astronomio, informadiko, botaniko, kemio, juro aŭ filozofio. En 2009 UEA lanĉis per La origino de specioj de Darvino serion de sciencaj klasikaĵoj, "Scienca Penso". Proprajn organizaĵojn havas i. a. blinduloj, skoltoj, ŝakistoj, go-ludantoj, kaj katamantoj. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la junulara sekcio de UEA, organizas internaciajn kunvenojn kaj eldonas periodaĵojn. Budaanoj, ŝintoismanoj, katolikoj, protestantoj, kvakeroj, Bahaanoj kaj ateismanoj havas siajn organizaĵojn, kaj multaj soci-aktivaj grupoj uzas la lingvon. En Sennacieca Asocio Tutmonda kunagas diversaj laboristaj tendencoj. Ankaŭ multaj aliaj asocioj uzas Esperanton.

Specifaj trajtoj

La strukturoj de Esperanto subtenas la naturan emon de la homa pensado al analogio kaj estas pli trarigardeblaj ol tiuj de la plej multaj etnaj lingvoj. Tre produktiva sistemo de vortfarado garantias jam en frua stadio de la lingvolernado nuancitajn esprimeblecojn. Sekve fruaj sukcesoj emocie motivas la lernanton progresi.

Tial la sama lernintenso ebligas akiri kompareblan lingvan nivelon en kompare tre malgranda ono de la tempo necesa por etna lingvo.

Ĝenerale pluraj monatoj da studado de Esperanto egalas kelkajn jarojn da lernado de lingvoj kiel la angla aŭ la franca.

Pro la domino de eŭropdevenaj vortradikoj, ekzemple azianoj bezonas pli da lernotempo, tamen malpli ol por alia azia lingvo.

En sia fama "Unua Libro" de Esperanto (1887) Zamenhof prezentis la gramatikon per 16 reguloj. (Kiu kompreneble ne klarigas ĉiujn detalojn de la lingvouzo.) Tiu ĉi gramatiko eniris en la sistemdokumenton "Fundamento de Esperanto", kiu, laŭ decido de la unua Universala Kongreso en 1905, garantiu la kontinuecon de la lingvoevoluo.



Vortoj

La vortoj devenas de diversaj lingvoj. La plejparto venis kaj venas el la ĉefaj eŭropaj lingvoj - precipe el la latina, la hispana, la franca, la germana kaj la angla. Pro la internaciemo, multaj etimoj apartenas al pluraj lingvoj eĉ se la konkreta formo en Esperanto similas pli al tiu de unu lingvo.

Etimaj ekzemploj

- **el latinidaj lingvoj:**
 - **el la latina:** *abio, sed, tamen, okulo, akvo*
 - **el la franca:** *dimanĉo, fermi, ĉe, frapi, ĉevalo, butiko*
 - **el la itala:** *ĉielo, fari, voĉo*
 - **el la portugala:** *saŭdado*
 - **pluraj:** *facila, fero, tra, verda*
- **el ĝermanaj lingvoj:**
 - **el la germana:** *baldaŭ, bedaŭri, haŭto, hundo, jaro, nur*
 - **el la angla:** *birdo, mitingo, spite, suno, ŝarko, teamo*
 - **el la sveda:** *ju ... des*
 - **pluraj:** *bildo, fiŝo, fremda, grundo, halti, hasti, hundo, ofta, somero, ŝipo, vintro*
- **el slavaj lingvoj:**
 - **el la pola:** *celo, ĉu, krado, luti, moŝto*
 - **el la rusa:** *barakti, serpo, vosto*
 - **pluraj:** *klopodi, krom, prava*
- **el pliaj hindeŭropaj lingvoj**
 - **el la greka:** *hepato, kaj, biologio, politiko, katolikoso*
 - **el la litova:** *du, tuj*
 - **el sanskrito:** *budho, nirvano, pado*

- **el armena:** *ĥaĉkaro, gavito,*
- **el Finno-Ugra grupo de la Uralaj lingvoj**
 - **el la samea:** *samea, boaco, jojko*
 - **el la finna:** *lirli, saŭno*
 - **el la hungara:** *cinci, ĉako, ĉardo, ĉardaŝo, ĉuro*
- **el semidaj lingvoj**
 - **el la hebrea:** *kabalo*
 - **el la araba:** *kadio, kaido, magazeno, matraco, admiralo*
- **el aliaj lingvoj**
 - **el la japana:** *cunamo, haŝio, hajko, ĵudo, noo, sakeo, utao, zeno*
 - **el la ĉina:** *maĝango, toŭfuo*
 - **el la korea:** *kimĉio, makolio, tekvondo*
 - **el la havaja:** *ukulelo, vikio*
 - **el la maoria:** *keo, kivio*

Principoj de la vortelekto

La tagoj de la semajno estas el la latinidaj lingvoj laŭ la francaj vortoformoj (*dimanĉo, lundo, mardo ...*), multaj partoj de la korpo laŭ la latinaj (*hepato, okulo, brako, koro, reno...*), kaj la unuoj de tempo el la ĝermanaj lingvoj laŭ formoj germanaj (*jaro, monato, tago...*). La nomoj de animaloj kaj vegetaloj ĉefe venas de la sciencaj latinaj nomoj.

Kiel jam supre estis videble, oni povas klarigi multajn vortojn per pli ol unu devenlingvo (vidu ankaŭ "Etimologia vortaro de Esperanto" de Ebbe Vilborg).

- **abdiki** laŭ angla, franca, itala kaj latina
- **abituriento** laŭ germana kaj rusa
- **ablativo** laŭ latina, angla, franca, itala kaj hispana, sed ĝi ankaŭ estas konata al germana lingvisto kaj lingvoŝatantoj
- **funto** laŭ pola, rusa, jida kaj germana
- **ŝnuro** laŭ germana, pola kaj ĉeĥa

Plue, Zamenhof zorgeme kreis malgrandan bazon de radikaj vortoj kaj afiksoj per kiu plia multo da vortoj estas konstruita. Pro tio, oni povas esprimi sin flue post lernado de malgranda vortprovizo (eble 500-2000 vortoj kaj afiksoj).

Kvankam Zamenhof klopodis internaciigi Esperanton, ĝi estas eŭropeca pro sia vortaro. Tiu trajto ne apartenas sole al Esperanto: la plejmulto de la projektoj de internaciaj lingvoj uzas la eŭropajn komunajn vortojn. La ĉefa diferenco inter Esperanto kaj aliaj planlingvoj devenas de la ne-eŭropeco de la gramatiko, kaj tiun ne-eŭropecon Zamenhof mem agnoskis kiel volan penon de li. La vorteroj kun gramatika funkcio aperas memstare ene de la vortaro, tiel ke ĉiu teksto estas deĉifrebla eĉ sen helpo de aparta gramatika klarigo. Aliflanke, li alkonformigis la gramatikajn vortetojn (interalie la vortfinaĵojn) tiel ke la eŭropanoj eĉ ne bezonu konscii pri tiu ne-eŭropeca gramatiko de Esperanto.

Specifaj vortoj en Esperanto

Ne ĉiuj vortoj de Esperanto havas signifon rekte diveneblan pere de aliaj lingvoj. Kelkaj el ili estas Esperantaj idiotismoj indiĝene naskitaj en Esperantujo, ĉu pro zamenhofs kaprico, ĉu pro natura lingvo-evoluo inter la parolantaro.

Laŭforme (rimarku, ke la listo enhavas mikse vortojn tute kutimajn kaj vortojn foje uzatajn sed neoficialajn):

aliĝilo, edzo, espo (slango por Esperanto), ĝi, kabei, nifo (laŭ angla *UFO*), pli, plej, ujo, zamenhofa.

Oni ankaŭ povus aldoni la tabelvortojn (inspiritaj de la rusaj escepte regulaj korelativoj) kaj la uzon de afiksoj kiel memstaraj vortoj (igi, ilo, ree, umi, ktp.).

Foje oni trovas la vortojn *aliel*, *alies*, *-iĉ-*, *kaŭ* (= kaj + aŭ), kaj *ri*, sed tiuj ne konformas al la reguloj de la Fundamento. Temas ĉe ili aŭ pri nekonsciaj pekoj kontraŭ la reguloj aŭ pri intencaj reformprojektoj.

Laŭsignife:

aligatori, fundamento, memzorganto, necesejo, kajmani, krokodili, krokodilo, fina venko, verda, verdo

Alfabeto kaj ortografio

La literumado aŭ ortografio ankaŭ estas tre simpla: unu fonemo por unu litero, kaj inverse.

Esperanto uzas la latinan alfabeton, sed ĉar la lingvo uzas pli ol 26 fonemojn (same kiel la plejmulto de lingvoj), por respekti la supran priskribitan principon, Zamenhof devis krei novajn literojn: la tiel nomatajn "ĉapelitajn" literojn: ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ.

Litero	a	b	c	ĉ	d	e	f	g	ĝ	h	ĥ	i	j	ĵ	k	l	m	n	o	p	r	s	ŝ	t	u	ŭ	v	z
IFA	ä	b	t̥	ʃ	d̥	e	f	g	d̥ʒ	h	x	i	j	ʒ	k	l	m	n	o	p	r	s	ʃ	t	u	u̯	v	z

"ŭ" kutime aperas nur post "a" aŭ "e".

En Esperantlingvaj TTT-paĝoj oni uzas (laŭ Google-statistiko en Marto 2010) la jenajn manierojn skribi la ĉapelitajn literojn de Esperanto:

- 87%: veraj supersignaj literoj, preskaŭ ĉiam laŭ Unikodo (rekte aŭ per numeraj signoreferencoj), iafoje laŭ Latino 3: ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ.
- 8%: surogate laŭ la x-sistemo: cx, gx, hx, jx, sx, ux.

Tiu sistemo havas avantaĝojn kontraŭ la h-sistemo, se komputiloj prilaboras tekston.

- 5%: surogate laŭ la h-sistemo: ch, gh, hh, jh, sh, u.

Tiu sistemo estis proponita de Zamenhof por kazoj, kiam ĉapelitaj literoj ne estas haveblaj. Kontraŭ la x-sistemo ĝi havas la avantaĝon, ke tekstoj estas pli facile legeblaj kaj ne aperas tiom strangaj, speciale al novuloj.

Prononcaj ekzemploj

Jen kelkaj oftaj frazoj, transskribitaj apude en la Internacia Fonetika Alfabeto:

<i>Saluton.</i>	/[sa.'lu.ton]/
<i>Kiel vi fartas?</i>	/['ki.el vi 'far.tas]/
<i>Kiel vi nomiĝas?</i>	/['ki.el vi no.'mi.đ3as]/
<i>Ĉu vi parolas Esperanton?</i>	/['tju vi pa.'ro.las es.pe.'ran.ton]/
<i>Mi ne komprenas vin.</i>	/[mi ne kom.'pre.nas vin]/
<i>Estas bela tago.</i>	/['es.tas 'be.la 'ta.go]/

🔊 Registraĵo de la preĝo *Patro Nia*

Lingvoevoluo

Kvankam Esperanto montriĝis plene taŭga por la celoj de la internacia komunikado, dum ĝia tuta historio ne mankis proponoj reformi detalojn. En la jaro 1908 el reformprovo rezultis nova lingvoprojekto, kaj fine aparta planlingvo: Ido. Kontraste al ĝi Esperanto de 1887 ĝis hodiaŭ evoluis sen radikalaj ŝanĝoj, sed malrapide kaj kontinue. Tiu (iam preskaŭ ne rimarkata, iam akre pridisputata) lingvoŝanĝiĝo ampleksas (krom la ĝenerala kresko de la vortprovizo) interalie la sekvajn tendencojn:

- prefero de mallongaj vortoformoj - ekzemple *spontana* anstataŭ *spontanea*
- arkaikiĝo de vortoj (ekz.: *pafilego*) kaj paralela enuziĝo de novaj (ekz.: *kanono*)
- nuanciga pliriĉiĝo de la vortostoko, ekzemple al *bleki* (= produkti bestosonojn) aldoniĝis tuta listo de verboj por unuopaj bestospecioj
- evoluo de signifodiferenco de paralelaj formoj - ekz.: *plaĝo* = bordostrio speciale taŭga por bano kaj sunbruniĝo, plej ofte tiucele transformita de homoj; *strando* = origina, natureca, pli "sovaĝa" bordostrio
- uzo de *k* (en kelkaj kazoj *h*) anstataŭ pli frua *ĥ*, precipe post *r*.
- uzo *-io* kiel sufikso en landonomoj, anstataŭ la fundamenta "ujo"
- pli ofta adverbigo - ekzemploj: *lastatempe* anst. *en la lasta tempo*, *aviadile* anst. *per aviadilo*, *haste kaj laste* anst. *hastante kaj kiel la lasta*
- evito de kompleksaj verboformoj
- uzo de afiksoj kiel memsignifaj vortoj - ekz.: *ega*, *eta*, *emo*, *malo*, *iĝi*, *estro*, *estraro*, *ilo*, *ilaro*, *ejo*, *ismo*

Proponoj pri reformoj de lingvaj detaloj estas lastatempe ne malofte diskutataj en la novaĵgrupo [soc.culture.esperanto](#); ekzemple enkonduko de nova triapersona ununombra pronomo sekse neŭtra (*ri*, *ŝli*) aŭ konsekvenca uzo de *ĝi* en tiu rolo.

Personaj pronomoj en Esperanto

nombro	singulara						plurala			nedifina	resenda*** (refleksivo)	
	ord	unua	dua		tria			unua	dua			tria
uzo			kutima	intima*	vira	ina	neŭtra**					
pronomo	mi	vi	ci	li	ŝi	ĝi	ni	vi	ili	oni	si	

(*) Kvazaŭ-arkaismo, tre malofte uzata.

(**) La seksindiferenta (*neŭtra* laŭ PIV difinebla kiel *presentanta neniun difinitan sekson*) pronomo »ĝi« povas esti (laŭ la ekzemploj el la Fundamento de Esperanto) uzata por objektoj aŭ kiel senseksa triapersona pronomo por vivantaj kreaĵoj kiel homoj. Tamen ĝi plej ofte estas uzata nur por aĵo, besto aŭ infaneto.

(***) Uzebla nur por la tria persono.

Parolantaro

La nombro de Esperanto-parolantoj estas ne precize konata. Nur eblas taksoj pri la kvanto de la tutmonda parolantaro. Ekde 2001 okazis popolnombadoj en pluraj landoj, ekzemple Hungario kaj Litovio, kiuj kalkulis ankaŭ la nombron de Esperanto-parolantoj (4.565 por Hungario, 844 por Litovio).

La plej multaj taksoj pri la tutmonda parolantaro varias inter 100 mil kaj 1,5 milionoj. La diversaj taksoj verŝajne priskribas malsamajn lingvonivelojn kaj malsaman oftecon de uzado: 100 mil celas la kvanton de homoj, kiuj regule uzas Esperanton, 500.000 inkluzivas tiujn, kiuj de tempo al tempo uzas la lingvon, 2 milionoj (Culbert) ankaŭ tiujn, kiuj jam dum multaj jaroj aŭ jardekoj ne plu uzas la lingvon. Pli altaj taksoj (ĝis aŭ super dek milionoj) inkluzivas supozeble ankaŭ tiujn, kiuj nur eklernis la lingvon; ili supozeble ankoraŭ rememoras kelkajn vortojn, sed fakte ne scipovas praktike utiligi la lingvon.

Se la kriterio estu tute flua altanivela lingvouzo, komparebla al denaska nivelo en aliaj lingvoj, la taksoj eĉ reduktiĝas je unu aŭ kelkaj dekmiloj. (Kp. la artikolon pri la nombro de Esperanto-parolantoj.)

Inter la planlingvoj (ekzemple, Interlingvao kaj Loĵbano), Esperanto estas la plej uzata kaj la sola kun evoluintaj daŭraj aplikoj en preskaŭ ĉiuj vivosferoj. Verŝajne pli ol 95 % de la parolantoj de planlingvo, eble eĉ 98 aŭ 99 %, parolas Esperanton; multaj planlingvuloj aldone parolas aŭ almenaŭ komprenas Esperanton.

Movado por Esperanto

La ĉefa tutmonda Esperanto-organizaĵo estas la Universala Esperanto-Asocio. Ĝi jam de kelkaj jardekoj kunrilatas kun la Unuiĝintaj Nacioj. UEA eldonas librojn, revuojn, lumdiskojn kaj jarlibron kun listoj de Esperanto-organizaĵoj kaj lokaj reprezentantoj en la tuta mondo. La Libroservo de UEA stokis en 2009 ĉirkaŭ kvin mil titolojn.^[22] Koncernan katalogon eblas aŭ peti perpoŝte aŭ konsulti en la retejo de la organizaĵo. La serio *Esperanto-Dokumentoj*, eldonata de UEA krom Esperante ankaŭ en la Angla, Hispana, Itala kaj Portugala lingvoj, enhavas fakverkojn kaj referatojn pri la aktuala situacio de la internacia lingvo. La publikaĵojn eblas akiri kaj perrete kaj persone en Roterdamo.

La plej fama simbolo de Esperanto estas la kvinpinta verda stelo, kiu simbolas la esperon (verdo estas koloro de espero) sur la kvin kontinentoj, kaj kiu ankaŭ ornamas la Esperantan flagon.

Subteno de internaciaj organizoj

Unesko (*Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo*) adoptis tri rezoluciojn favorajn al Esperanto (1954, 1985 kaj 1993), per kiuj ĝi agnoskas la indajn atingaĵojn de Esperanto kaj instigas ĝian utiligon. Sed, malsimile al la latina en mezepoka Eŭropo kaj la angla en nia jarcento, bazo de lernejoj, universitatoj kaj lernolibroj mankas al Esperanto.

Ankaŭ aliaj eksterkomunumaj organizoj kaj konferencoj subtenis Esperanton, ekzemple en 1980 en Manilo, la ĉefurbo de Filipinoj, la Monda Turisma Konferenco (organizita de Monda Turisma Organizo)^[33].

Notindas krome kelkaj rezolucioj kaj proponoj ĉe Ligo de Nacioj, Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj organizoj.^[34]

Kulturo

Literaturo

Esperanto havas literaturon, parte originalan, parte tradukitan el naciaj lingvoj, entute ĝi enhavas ĉirkaŭ 50 mil titolojn.^{[35][36]} Bedaŭrinde, malmultas esperantaj verkoj tradukitaj al naciaj lingvoj, tial la ekstermovada publiko ne povas facile legi ilin.

La riĉan literaturan tradicion agnoskas ankaŭ la PEN-Klubo, kies Esperanta sekcio estis fondita dum la 60-a kongreso de la Klubo en Septembro 1993. La verkadon en Esperanto stimulas la Akademio Literatura de Esperanto, fondita en 2008. Al gravaj nuntempaj verkistoj skribantaj Esperante apartenas: Trevor Steele (Aŭstralio), Manuel de Seabra (Katalunujo), István Nemere (Hungarujo), Spomenka Štimec (Kroatujo); versistoj Miĥael Giŝpling (Rusujo / Israelo), Mauro Nervi (Italujo), Mao Zifu (Ĉinujo), Abel Montagut (Katalunujo) kaj Eli Urbanová (Ĉeĥujo); eseistoj kaj tradukistoj Probal Dasgupta (Barato), Humphrey Tonkin (Usono) kaj Kurisu Kei (Japanujo). La versistoj William Auld, Marjorie Boulton kaj Baldur Ragnarsson estis kandidatigitaj por la Nobel-Premio pri Literaturo.^[22]

El konataj Esperantigitaj literaturaj verkoj kaj eldonitaj antaŭ nelonge menciindas ekzemple *La oldulo kaj la maro* de Hemingway, *La Mastro de l' Ringoj* de John Ronald Reuel Tolkien, *Cent jaroj da soleco* de Gabriel García Márquez, *La lada tambureto* de Günter Grass, *La Libro de la mirindaĵoj* de Marco Polo aŭ granda familia sagao de Cao Xueqin *Ruĝdoma sonĝo*. Por infanoj ekzistas krom Asteriks aŭ Tinĉjo ankaŭ Esperantigita *Pipi Ŝtrumpolonga* kaj la tuta novelaro Muminvalo fare de la Suoma aŭtorino Tove Jansson; la tekstoj de iuj tradukoj atingeblas ankaŭ enrete.

Famaj aŭtoroj de verkoj en Esperanto

- William Auld, Skotujo
- Kálmán Kalocsay, Hungarujo
- Edmond Privat, Svisujo
- Julio Baghy, Hungarujo
- Laŭlum, Ĉinujo
- Reto Rossetti, Svisujo, Britujo
- Kazimierz Bein (Kabe), Polujo
- Mijamoto Masao, Japanujo
- Raymond Schwartz, Francujo
- Marjorie Boulton, Anglujo
- Abel Montagut, Katalunujo
- Spomenka Štimec, Kroatujo
- Jorge Camacho, Hispanujo
- Nemere István, Hungarujo
- Gaston Waringhien, Francujo
- Fernando de Diego, Hispanujo
- Claude Piron, Belgujo, Svisujo
- Ludoviko Zamenhof, Polujo

Muziko

Muzikaj ĝenroj en Esperanto inkluzivas popularajn kaj popolajn kantojn, rokmuzikon, kabaredon, kantojn por solistoj kaj ĥoro, kaj operon. Popularaj komponistoj kaj artistoj, inter aliaj Elvis Costello kaj Michael Jackson, registris en Esperanto, verkis orkestraĵojn inspiritajn de la lingvo, aŭ uzis ĝin en siaj propagandaj materialoj. Kelkaj kantoj el la albumo Esperanto de Warner Brothers, kiu eldoniĝis – pure Esperante – en Hispanujo en Novembro 1996, atingis altajn rangojn en Hispanaj muzikkonkursoj. Klasikaj orkestraĵoj kaj ĥorverkoj kun Esperanto-teksto inkluzivas *La Koro Sutro* de Lou Harrison kaj la *Simfionion n-ro 1 Esperanto* de David Gaines (ambaŭ el Usono). En Franca Tuluzo ekzistas muzikeldonejo Vinilkosmo, specialiĝanta al produktado de Esperanta muziko. Tiun eblas trovi ankaŭ enrete, inkluzive kalkajn retejojn dediĉitajn al Esperanta karaokeo.^[22]



La kvarmembra Nederlanda muzikgrupo Kajto koncentriĝas pri Frisa popola muziko, maristaj kantoj kaj kanonoj

Teatro kaj kino

Teatraĵoj de dramverkistoj tiel diversaj kiel Goldoni, Ionesco, Ŝekspiro kaj Ayckbourn estis lastatempe prezentitaj en Esperanto. Multaj dramoj de Ŝekspiro ekzistas en Esperanta traduko; Reĝo Lear estis prezentita en Esperanto en Hanojo (Vjetnamujo), en Decembro 2001, kun loka rolularo.

La utiligo de Esperanto en kino estas malpli ofta. En scenoj de La Granda Diktatoro de Chaplin aperis afiŝoj en Esperanto, en Delekto de Idioto kun Clark Gable kaj la Japana filmo Jan Arima iuj dialogoj estis en Esperanto. Tutvesperaj filmoj uzantaj nure Esperanton estas esceptegaj, apartenas al ili ekzemple kulta Inkubo kun William Shatner en la ĉefa rolo, tamen ekzistas proksimume dek kvin, kiuj iel la temon de la internacia lingvo tuŝas. Lastatempe aperis ankaŭ kelkaj amatoraj Esperantistaj filmprojektoj kaj asocioj, produktantaj mallongajn filmetojn plene Esperantajn, ilia longo estas kutime ĉirkaŭ kelkdek minutoj.^{[22][37]}

Periodaĵoj

Pli ol cent gazetoj kaj revuoj regule aperas en Esperanto, inkluzive la novaĵrevuon Monato, la literaturan revuon Beletra Almanako, la junularan ĵurnalon Kontakto kaj la revuon Esperanto de UEA. Dusemajna aktualaĵ-gazeto Eventoj estas ofertata ankaŭ en senpaga elektronika versio. Abonantoj povas perrete akiri ankaŭ multajn aliajn gravajn gazetojn, inkluzive retarkivojn de malnovaj numeroj. Estas periodaĵoj pri medicino kaj scienco, por junularo, religiaj magazinoj, edukaj kaj pedagogiaj periodaĵoj, literaturaj revuoj kaj special-temaj eldonaĵoj.^[22]

Radioelsendo kaj televido

Radiostacioj en Brazilo, Ĉinujo, Kubo, Polujo kaj Vatikano elsendas regule en Esperanto. Plimultiĝas programoj aŭdeblaj ankaŭ interrete, aliaj stacioj (kaj profesiaj kaj amatoraj) agas precipe aŭ nur perrete. Al konataj internacilingvaj podkasto apartenas ekzemple la Radio Verda, funkcianta ekde 1998. Televidoj en diversaj landoj proponas kursojn de Esperanto, inkluzive la plej aktualan 16-partan adapton de la kurso „Mazi en Gondolando“ de BBC, kiun elsendis la stacio *Polujo 1 (TVP1 – Telewizja Polska 1)*.^[22] La saman kurson elsendis dum pluraj jaroj ankaŭ ne plu ekzistanta televidstacio de Saarbrücken.^[38] En la jarintervalo 2005–2006 aktivis ankaŭ projekto de la internacia enreta Esperanta televidstacio de la nomo „Internacia Televido“, funkcianta enkadre de la retejo Ĝangalo.^[22]



La Esperanta redakcejo de la Pola Radio preparas ĉiutage dudekminutan podkaston

Interreto

Elektronikaj retoj, precipe la interreto, estas la plej rapide disvastiĝantaj komunikiloj inter uzantoj de la internacia lingvo. Ekzistas kelkcentoj da diskutgrupoj tiulingve, traktantaj pri diversaj temoj, de familia uzo de Esperanto ĝis al la ĝenerala relativeca teorio. Esperanto uzatas ankaŭ en diversaj tujmesaĝaj protokoloj, kiel Jabber, ICQ, IRC, MSN, Skype aŭ Paltalk. Troveblas miloj da internacilingvaj retpaĝoj. Multaj komputilaj programoj, ekz. literumiloj, gramatik-kontroloiloj kaj klavar-aranĝoj, estis kreitaj en kaj iam ankaŭ por Esperanto. Programoj kiel OpenOffice.org, Fajrovulpo, IrfanView, la grafikaj labormedioj GNOME kaj KDE, kaj la operaciumoj Ubuntu kaj Mandriva estas haveblaj en Esperanto. Popularaj retejoj kiel Guglo, Vikipedio, Vizaĝlibro kaj Ipernity havas ankaŭ Esperanto-versiojn.^[22]

Esperanto kaj internacia uzo por pagata laboro

Ekzistas kelkaj kampoj, en kiuj oni jam hodiaŭ uzas Esperanton profesie. Kiel ekzemploj povas servi eldona agado aŭ turismo (ĝenerala aŭ kleriga). Pli pri la profesia uzo de Esperanto oni povas legi ekzemple en Petr Chrdle: *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj* ^[39] (KAVA-PECH, 1995). ^[40]

Kritiko kaj respondoj al kritiko

Esperanto estas foje kritikata de ne-esperantistoj aŭ eĉ de esperantistoj mem. Kelkaj kritikoj estas kontraŭ internaciaj helplingvoj ĝenerale:

- "Internacia helplingvo ne havas kulturon." (Esperantistoj ofte respondas, ke ja ekzistas Esperanta literaturo kaj certaj tradicioj en la Esperanto-komunumo; iuj esperantistoj pli emfazas la rolon de Esperanto kiel ponto inter malsamaj kulturoj; kelkaj kombinis ĉi tiujn du alirojn per la koncepto de pontokulturo.)
- "La toleremo pri malperfektecoj ĉe internaciaj helplingvoj estas malpli ol ĉe etnaj lingvoj. Ĉar neniu internacia helplingvo povas esti perfekta, ĝi neniam estos vaste akceptata de la publiko."

Aliaj kritikoj temas pri Esperanto specife:

- Kelkaj, precipe la subtenantoj de naturismaj planlingvoj, kritikis ke Esperanto ne direktas sin sufiĉe laŭ la grandaj eŭropaj lingvoj (kutime ili celas ĉefe latinon kaj la latinidajn lingvojn, aŭ latinidajn formojn en aliaj lingvoj). Ekzemple, ili kritikis la tabelvortojn aŭ vortfaradon kiel "malsanulejo" anstataŭ pli eŭropecan "hospitalo". Kontraŭargumento estas, ke ŝanĝo al pli da eŭropeco eble igus Esperanton pli facila por eŭropanoj, sed samtempe pli draste malfaciligus ĝin por ne-eŭropanoj, kiuj devus lerni multajn apartajn "eŭropajn" formojn.
- Aliflanke Esperanto estas ofte kritikata esti tro eŭropeca. Ĝiaj vortradikoj kaj ĝia gramatiko klare devenas de eŭropaj lingvoj, kio laŭ la kritikantoj nuligas (aŭ malpliigas) ĝian neŭtralecon. Esperantistoj ofte respondas ke la aglutina strukturo de Esperanto similas pli al la turka, japana aŭ bantuaj lingvoj ol al la plej multaj eŭropaj lingvoj.
- Kelkaj kritikis ke la seksa malsimetrio en Esperanto estas lingva seksismo. Oni kritikis ke pluraj parenc-radikoj (kiel "patr-", "frat-" kaj "edz-") havas baze viran signifon, dum necesas aldoni "-in-" por paroli pri inoj. Aldone oni kritikis ke multaj aliaj vortoj (kiel "instruisto", "anglo" kaj la pronomo "li") servas kaj por signi viran personon kaj por signi ajnaseksan personon, dum ekzistas apartaj vortoj por inaj personoj ("instruistino", "anglino", "ŝi"). Riistoj kaj iĉistoj provas forigi tiun malsimetron el Esperanto.
- Oni kritikis la devigan akuzativan finaĵon "-n". Esperantistoj respondas ke tio necesas por samtempe havi klarecon kaj grandan liberecon en la vortordo.
- Oni kritikis la supersignajn literojn de Esperanto. Esperantistoj defendas ilin argumentante ke ili necesas por konservi la principon "unu sono — unu litero", ĉar la 26 bazaj literoj de la latina alfabeto ne sufiĉas por la 28 fonemoj de Esperanto. Ankaŭ estas fakto, ke la granda plimulto de la lingvoj uzantaj variantojn de la latina alfabeto uzas - same kiel Esperanto - diakritajn signojn por klarigi la prononcon de multaj literoj.
- Neesperantistoj ofte kritikis Esperanton ne kiel la lingvon mem, sed oni kritikis la fakton, ke oni nenie interkompreniĝos per ĝi. Respondo al demando "Kaj kie oni parolas per ĝi?" ke ĉie, estas ne tute prava. La neesperantista demandanto demandas pri tio, kie en kiu hotelo, kie en kiu oficejo, kie en kiu malsanulejo, kie en kiu magazeno, kie en kiu fervojstacio ktp. ktp. li povus uzi tiun ĉi lingvon. Kaj ni konfesu, ke ili pravas.

Metafora uzo de la vorto Esperanto

Metafore la vorto *esperanto* iam estas uzadata por priskribi ion internacian, perigan, miksitajn aŭ neŭtralan – tiel ekzemple Ĝavo estas markata kiel "esperanto de la programlingvoj aŭ Linukso kiel "esperanto en la komputila mondo".^[41]

Tia uzo tamen povas ofte konfuzi. Ekzemplon prezentas la etikedo "esperanta monunuo", uzita por Eŭro: tiu estis kreita por anstataŭi aliajn monunuojn – Esperantistoj tamen, krom esceptoj, ne klopodas forigi la naciajn lingvojn.^{[42][43]} La komuna Eŭropa monunuo tamen estas neŭtrala, same kiel Esperanto.

Bibliografio

- E. van Someren, Republication of the thesis "The EU Language Regime, Lingual and Translational Problems";
- P. G. Forster, The Esperanto Movement. The Hague: Mouton Publishers, 1982. ISBN 90-279-3399-5;
- C. Gledhill, The Grammar of Esperanto: A Corpus-Based Description. Second edition. Lincom Europa, 2000. ISBN 3-89586-961-9;
- J. Wells, Lingvistikaj aspektoj de Esperanto ("Linguistic aspects of Esperanto"). Second edition. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1989;
- W. Auld. La fenomeno Esperanto ("Il fenomeno esperanto"). Rotterdam. UEA. 1988;
- C. Piron. La bona lingvo (La lingua buona) trattato sulla lingua, Paperback, 1989. ISBN 978-963-571-294-6;
- U. Lins. La lingua pericolosa. Storia delle persecuzioni contro l'esperanto sotto Hitler e Stalin. Traccedizioni. 1990. ISBN 88-7205-000-6;
- P. Janton. Esperanto. Lingua, letteratura, movimento. Cooperativa Ed. Esperanto. 1996. ISBN 88-85872-07-7;
- F. Amerio; G. Bonvecchiato; G. C. Fighiera. Esperanto: dati e fatti. FEI Fondo Marelli. 2002. ISBN 88-85872-11-5;
- G. Formizzi, Le radici culturali dell'esperanto. La pedagogia di Giovanni Amos Comenio. Gabrielli Editori. 2006. ISBN 88-6099-007-6;
- C. Minnaja. L'esperanto in Italia. Alla ricerca della democrazia linguistica. Il Poligrafo. 2007. ISBN 88-7115-546-7.

Notoj kaj fontoj

- [1] Harald Haarmann: Kleines Lexikon der Sprachen. Von Albanisch bis Zulu. München: Beck. 2001 (p. 115-116): Esperanto wird "auch von etlichen tausend Menschen in der Welt (z. B. in Ungarn, Österreich, Bulgarien, Japan, USA) als Muttersprache erlernt". (Esperanto estas "lernata ankaŭ de kelkaj mil homoj en la mondo (ekz. en Hungario, Aŭstrio, Bulgario, Japanio, Usono) kiel gepatra lingvo".) Haarmann atentigas, ke intertempe "ekzistas denaskuloj de la dua kaj eĉ tria generacio". Haarmann pri Eo (<http://www.fischer-zim.ch/esperanto/lingvaj-temoj/haarmann-leksikono-eo.htm>). Pli frue Ethnologue (2005) skribis pri 200 - 2000; nuntempe ne plu sur ethnologue.com (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=epo). Kp. ankaŭ Joŭko Lindstedt: Oftaj demandoj (<http://www.helsinki.fi/~jlsindst/odo.html>)
- [2] BYRAM, Michael [2001]. *Routledge Encyclopedia of Language Teaching and Learning* (angle). Routledge. ISBN 0-4153-3286-9.
- [3] GORDON, Raymond G., Junior [2005]. *Ethnologue : Languages of the World* (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=epo), 15-a eldono (angle), Dallas, Texas: SIL International. ISBN 13-978-1-55671-159-6.
- [4] JACOBS, Joseph – HARRIS, Isidore. *Zamenhof, Lazarus Ludwig*. JewishEncyclopedia.com. Legita 2008-08-14 Atingebla interrete (<http://www.jewishencyclopedia.com/view.jsp?artid=20&letter=Z>). (Angle.)
- [5] Zamenhofo, Ludoviko Lazaro. *Letero de L. Zamenhof al Nikolaj Afrikanovich Borovko (1895) – О происхождении эсперанто*. МИР ЭСПЕРАНТО. Legita 2008-08-14. Atingebla interrete (<http://miresperanto.narod.ru/zamenhof/borovko.htm>). (Esperante, ruse.)
- [6] Zamenhof, L. *Lingvaj Respondoj*. Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto. 6-a eldono. Marmande : Esperantaj Francaj Eldonoj, 1962. LR 51. Atingebla interrete (<http://www.luin.se/inko/109-7.pdf>).
- [7] VONDROUŠEK, J. *Z histórie esperanta* Esperanto.sk. Legita 2007-09-01. Atingebla interrete. (<http://www.esperanto.sk/eo/historio.php>) (Esperante, slovake.)
- [8] PAGE, Hugh R., Jr. *Esperanto* Great Barrington (Massachusetts, USA): Berkshire, 2005-05-24. Legita 2007-09-01. Atingebla interrete. (http://www.berkshirepublishing.com/assets_news/WHTG/articles/Esperanto_24-May-2005.html) (Angle.)
- [9] ČELIAUSKAS, Petras. Zamenhof en Veisiejai. En *Litova Stelo* Numero marto-aprilo, jarkolekto 1998. Litova Esperanto-Asocio. Legita 2008-08-14. Atingebla interrete. (<http://www.is.lt/LEA/zamenhof.htm>) (Esperante.)

- [10] Drezen, E. *Zamenhof kaj reformoj en esperanto*. МИР ЭСПЕРАНТО. Atingebla interrete. (http://miresperanto.narod.ru/zamenhof/drezen_zamenhof/reformoj.htm) Legita 2008-08-14. (Esperante.)
- [11] *Pri la reformoj*. Interpopolalingvo.inf.hu. Atingebla interrete. (<http://www.angelfire.com/ny2/ts/reformoj.html>) Legita 2008-08-14. (Esperante.)
- [12] Kolker, Boris. *Enigmoj de Ludoviko Zamenhof*. Esperanto-mv.pp.ru. Atingebla interrete. (<http://esperanto-mv.pp.ru/Cetero/enigmoj.html>) Legita 2008-08-14. (Esperante.)
- [13] Kniivilä, Kalle. *Informfluoj en Esperantujo*. diVERse. Atingebla interrete. (<http://www.kniivila.net/2005/informfluoj-en-esperantujo>) Legita 2008-08-14. (Esperante.)
- [14] *Konciza historio de IKUE*. Roma (Italujo) : IKUE. Atingebla interrete. (<http://www.ikue.org/historio.html>) Legita 2007-09-09. (Esperante.)
- [15] *NB online – Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo*. Wien (Aŭstrujo) : Österreichische Nationalbibliothek. Atingebla interrete. (<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>) Legita 2007-09-09. (Germane.)
- [16] Malovec, Miroslav. *Esperantiští spisovatelé a jejich díla*. Atingebla interrete. (<http://members.chello.cz/malovec/Abeceda.htm>) Legita 2007-09-09. (Ĉeĥe.)
- [17] *E-Euroscola: Rezolucioj de Unesko por Esperanto*. Atingebla interrete. (<http://e.euroscola.free.fr/unesco.htm>) Legita 2007-09-06. (Esperante.)
- [18] *La dekreto pri la normoj por la cerebro de la Meso en esperanto*. Roma (Italujo) : IKUE. Atingebla interrete. (<http://www.ikue.org/historio/mesonormoj.htm>) Legita 2007-10-18. (Esperante.)
- [19] *La dekreto por la aprobo de la Meslibro kaj Legaĵaro en Esperanto*. Roma (Italujo) : IKUE. Atingebla interrete. (<http://www.ikue.org/historio/meslibro.htm>) Legita 2007-10-18. (Esperante.)
- [20] *Catholic Prayers in the Languages of the World: Esperanto*. Città del Vaticano : Agenzia Fides. Atingebla interrete. (<http://www.fides.org/aree/news/newsdet.php?idnews=8533&lan=eng>) Legita 2007-10-18. (Angle.)
- [21] GRADDOL, David. *The Future of English?* The British Council, 1997 Atingebla interrete. (<http://www.britishcouncil.org/de/learning-elt-future.pdf>) Legita 2007-04-15. (Angle.)
- [22] *Universala Esperanto-Asocio. Ĝisdate pri Esperanto [interrete]*. Universala Esperanto-Asocio, 2002-12-03, [cit. 2007-12-07]. http://www.uea.org/informado/ghisdate/ghisdate_eo.html.
- [23] JANTON, Pierre; TONKIN, Humphrey. *Esperanto: language, literature, and community*. New York : State university of New York Press, c1993. 169 pĝ. ISBN 0-7914-1254-7.
- [24] Ziko Marcus Sikosek: *Esperanto sen mitoj*. Antverpeno 2003². Pĝ. 247
- [25] *Seznam doporučených ukazatelů sčítání* (http://www.czso.cz/slzb/slzb.nsf/i/seznam_doporucenych_ukazatel_u_scitani). Praha: Český statistický úřad, aktualigita 2007-09-13, citita 2007-09-16.
- [26] Williams, N. *A language teaching experiment*. Canadian Modern Language Review, 1965. Ĉapitro 22.1, pĝ. 26–28.
- [27] CHRDL, Petr. *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*. Dobříchovice: KAVA-PECH, 1995. 40 pĝ. ISBN 80-85853-16-7.
- [28] *List of NGOs maintaining official relations with UNESCO*. UNESCO. Citita je 2007-09-01. http://erc.unesco.org/ong/ONGlist_p.asp?language=E. (Angle.)
- [29] TONKIN, Humphrey – FETTES, Mark. *About Esperanto*. (Eldonserio Esperanto Document, 43a serio.) Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1996. 16 pĝ. Atingita je 2008-04-12. <http://www.esperantic.org/ced/espe.htm> (Angle.)
- [30] http://www.change.org/ideas/view/obama_introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools
- [31] KIEFTE, Joop. *Pasporta Servo 2.0 – Internacia gastiga servo per Esperanto*. Eldonis Pasporta Servo. Citita je 2009-06-21. <http://www.pasportaservo.org> (Esperante.)
- [32] PIRLOT, Germain. *Esperanto en universitatoj*. Universala Esperanto-Asocio, eldonita 2003-04-17. Citita 2008-08-15. <http://www.uea.org/agadoj/instruado/pirilot.html> (Esperante.)
- [33] Teksto kaj komento en Eventoj 94 (<http://www.esperanto.hu/eventoj/arkivo//eve-094.htm>)
- [34] ESPERANTO KAJ INTERNACIAJ ORGANIZAJĴOJ (<http://www.uea.org/informado/ED38-eo.html#enhavo>)
- [35] *Disponigi nian kulturon al ĉiuj*. Citita 2007-09-06. m_disku.htm (el Retarkivo 2005) (http://wayback.archive.org/web/2005/http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/m_disku.htm) (Esperante.)
- [36] *Eventoj*, 1–2/majo 98, n-ro 148–149. Citita 2007-09-06. <http://www.eventoj.hu/arkivo/eve-1489.htm> (Esperante.)
- [37] *Esperanto movie titles*. Internet Movie Database. Atingita je 2007-09-01. <http://www.imdb.com/List?language=Esperanto&&tv=off&&nav=/Sections/Languages/Esperanto/include-movies&&heading=10;Esperanto%20movie>
- [38] Hauser, Peter. Tradicia Kultura Semajnfino. En *La Ondo de Esperanto*, jaro 2003, n-ro 1. <http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/99-lode.htm#99-22>. Atingita 2010-02-20.
- [39] <http://katalogo.uea.org/index.php?inf=4856&id=579&recenzo=montru>
- [40] Ankaŭ, se vi deziras labori per Esperanto aŭ trovi laboranton kiu parolas Esperanton, bonvolu uzu la senpagan retservon Eklaboru (<http://www.eklaboru.com>).
- [41] Jalinĥ. Lidé jsou počítače a Java je Esperanto. En *AbcLinuxu*. Eldonita 2007-06-06, atingita 2007-09-16. (Ĉeĥe.) Atingebla je <http://www.abclinuxu.cz/blog/jalinh/2007/6/6/182356>.
- [42] *Euro*. Česká národní banka. Atingita 2008-09-17. Eldonita en Praha. (Ĉeĥe.) Atingebla je http://www.cnb.cz/cs/mezinarodni_vztahy/euro.

[43] *Pražský manifest*. Eldonis Starto. Atingita 2008-09-17. (Multlingve.) Atingebla je <http://members.chello.cz/malovec/manifest.htm>, <http://www.uea.org/informado/pragm/index.html>

Eksteraj ligiloj

- Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (<http://www.bertilow.com/pmeg>)
- Multlingva Informcentro pri Esperanto (<http://esperanto.net/>) en 62 lingvoj
- Terminaroj ĉe UEA (<http://uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html>)
- Datumbazo de originalaj Esperanto-verkaĵoj kaj aŭtoroj (<http://www.geocities.com/origlit/lit/index.html>), kun biografioj kaj bildoj
- Diskutgrupo "Ni parolas Esperante" (http://it.groups.yahoo.com/group/ni_parolas_esperante)
- TERRA Esperanto ekspedicio (<http://terra-esperanto.blog.ca/>) - Renkonte al teroj kaj homoj: Esperanto de Oriento ĝis Okcidento
- Mi lernas la internacian lingvon Esperanto sed nur se 20,000,000 homoj tra la tuta mondo faras same (<http://vikio.iompostiom.net/index.php?title=Dumilionoj/eo>) - Tutmonda promeso
- Parolu: Maŝina parolo en Esperanto (<http://lingvo.org/parolu/>)
- Esperanta Ontologio (<http://www.epistemica.com/papers/EsperantaOntologio.pdf>), Marco Romano, 2007, Epistemica S.r.l. Milano, Italio
- Prelego *Esperanto kaj la Katolika Eklezio*

Kritiko kaj respondoj al kritiko

- **angle** Esperantokritika paĝaro (<http://www.xibalba.demon.co.uk/jbr/ranto/>)
- **angle** Ĉu la Esperanta vortaro estas tro vasta? (<http://www.rickharrison.com/language/bloated.html>)
- **angle** Eterna movilo aŭ flugmaŝino? Pri la serĉo por punta lingvo... (<http://home.pacific.net.au/~ferment/flyingmachine.html>)

Artikolaj fontoj kaj kontribuantoj

Esperanto *Fonto:* <http://eo.wikipedia.org/w/index.php?oldid=4339848> *Kontribuantoj:* AVRS, Airon90, Aktalo, Alaŭdo, Alboru, Alessandro, Amikeco, Andy, Apcbg, ArnoLagrange, Bdesham, Beladono, Bertilow, Blahma, Brion VIBBER, Cappuccino, Chuck SMITH, CubeF, DidCORN, DidiWeidmann, Drynet, Duko-de-Benia, Esperantix, Esperantoil, Euyasik, Gabriel BEECHAM, Golfestro, Greguar, Hans, Hashar, Helmut Welger, IJKL, IVLIVS, Jan-kord, Jchthys, Jean Yévenes, Jim Henry, Jorge CAMACHO, JorgeCamacho, Kaha, Kalidasa 777, Kani, Keldan, Kmoksy, Komponisto, KoreKorin', Kriko, Kunar, Kwamikagami, LaPingvino, Le Hibou, Livajo, Lotic, Lu Wunsch-Rolshoven, Lupíro, Madrigal, Mahmudmasri, Maks84eo, Maksim, Marcos, Martin strid, Mat956, Meitneriu, Menchi, Montanesko, Multkolorbirdo, Narvalo, Naŭunuunu, NickK, Objectivesea, Ombresaco, Ora Unu, Paul Ebermann, Pejno Simono, Petr Tomasovsky, Petrus Adamus, Pikolas, Purodha, RG72, Razilklingo, Remux, Robert Chamberlain, Robert Weemeyer, Roberto, Ryoho, Rémiĥ, SGC.Alex, Sagitario, Schuetzm, Scott REDD, Sibazyun, So9q, Sonjaa, Sroterpomkapo, Ssire, Surfio, TFCforever, Talnat, Thomas Guibal, Tlustulimu, Tohavubohuo, Tonymec, Umberto, Unukorno, Verdlanco, Verdulo, Vitred, Yekrats, Yun, Ziko, Zmila, Zorhof-86, Zuazua, konvertilo, Хинт, 206, לַעֲרִיבֵי הַדָּשָׁן, Anonimaj redaktoj

Bildaj fontoj, licencoj kaj kontribuantoj

- Dosiero:Disambig.svg** *Fonto:* <http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Disambig.svg> *Permesilo:* Creative Commons Attribution-Sharealike 2.5 *Kontribuantoj:* Stephan Baum (converted to SVG by different users, see below)
- Dosiero:Loudspeaker.svg** *Fonto:* <http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Loudspeaker.svg> *Permesilo:* Public Domain *Kontribuantoj:* Bayo, Gmaxwell, Husky, lamunknown, Mirithing, Mysel488, Nethac DIU, Omegatron, Rocket000, The Evil IP address, Wouterhagens, 19 Anonimaj redaktoj
- Dosiero:1908-kl-t-zamenhof.jpg** *Fonto:* <http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:1908-kl-t-zamenhof.jpg> *Permesilo:* Public Domain *Kontribuantoj:* Henryk Borawski, Petrus Adamus, Slomox, VadimVMog, Ziko
- Dosiero:Unua Libro.jpg** *Fonto:* http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Unua_Libro.jpg *Permesilo:* Public Domain *Kontribuantoj:* Ludoviko Lazaro ZAMENHOF
- Dosiero:1905-uk-eliro-el-la-kongresejo.jpg** *Fonto:* <http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:1905-uk-eliro-el-la-kongresejo.jpg> *Permesilo:* nekonata *Kontribuantoj:* Henri Caudevelle (1861–1936)
- Dosiero:2008-07-26 uk rememoro mortintoj.JPG** *Fonto:* http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:2008-07-26_uk_rememoro_mortintoj.JPG *Permesilo:* Creative Commons Attribution-Sharealike 3.0,2.5,2.0,1.0 *Kontribuantoj:* Ziko van Dijk
- Dosiero:Johano Paŭlo la 2-a kaj la Esperanta Meslibro 004.jpg** *Fonto:* http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Johano_Paŭlo_la_2-a_kaj_la_Esperanta_Meslibro_004.jpg *Permesilo:* Creative Commons Attribution-Sharealike 2.5 *Kontribuantoj:* Fotografia FELICI – www.fotografiafelici.com
- Dosiero:Flag of Esperanto.svg** *Fonto:* http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Flag_of_Esperanto.svg *Permesilo:* Public Domain *Kontribuantoj:* Gabriel Ehrnst GRUNDIN
- Dosiero:Jubilea simbolo.svg** *Fonto:* http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Jubilea_simbolo.svg *Permesilo:* Public Domain *Kontribuantoj:* Kristjan
- Dosiero:Johano Paŭlo la 2-a kaj la Esperanta Meslibro 001.jpg** *Fonto:* http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Johano_Paŭlo_la_2-a_kaj_la_Esperanta_Meslibro_001.jpg *Permesilo:* Creative Commons Attribution-Sharealike 2.5 *Kontribuantoj:* Fotografia FELICI – www.fotografiafelici.com
- Dosiero:23042006(171).jpg** *Fonto:* [http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:23042006\(171\).jpg](http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:23042006(171).jpg) *Permesilo:* Creative Commons Attribution-Sharealike 2.5 *Kontribuantoj:* Verdlanco
- Dosiero:Kajto.jpg** *Fonto:* <http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Kajto.jpg> *Permesilo:* GNU Free Documentation License *Kontribuantoj:* Yves NEVELSTEEN
- Dosiero:Pola Radio en Esperanto.jpg** *Fonto:* http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:Pola_Radio_en_Esperanto.jpg *Permesilo:* Creative Commons Attribution-Share Alike *Kontribuantoj:* Marek BLAĤUŚ

Permesilo

Creative Commons Attribution-Share Alike 3.0 Unported
[//creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/](http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/)